# Saluton!

**Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 7 (22), Julio 2006**

**Adreso (provizora):**
**Esperanto Societo de Ŝikago**
**p/a Viktor' Pajuk**
**8228 O'Connor Dr., # 2F**
**River Grove, IL 60171**
**(773) 344-2276**
**www.esperanto-chicago.org/**

**Estraro:**
Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – d-ino Gertrude Novak
Kasisto – Karlo Gunn

**Membrokotizoj**:
Membro-subtenanto $40/jare;
Familio $30; Regula $20;
Studento aŭ pensiulo $10.

Gifts are welcome also.
**Dues** are needed for the routine expenses of our Society.
Check should be payable to:
**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

**Kunvenoj:**
Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas la kvaran mardon de ĉiu monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**
Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

**Bonvenon!**

Ĉu por la monda samideanaro estas io pli grava ol la ideo de la IL mem? Antaŭ nelonge mi pensis ke NE, sed nun mi devas ŝanĝi opinion: informoj pri la E-agado en Brazilo, Germanio atestas, ke multaj gravaj (por e-istoj) kunsidoj estis interrompitaj por spekti matĉojn de la lasta piedpilka mondpokalo, kiu okazis en Germanio. Vere: panon kaj amuzon! Kaj piedpilko konkeris en amuza parto nian karan E-on.

## Laste okazis



La junian kunsidon de nia E-societo vizitis kaj gvidis s-ino Inna Vozlinski el Nova Hempŝiro (la redakcio pardonpetas pro la misinformo, ke ŝi venis el Nova Ĝerzio). Komencinte ŝian E-agadon en fruaj 80j. en la iama sovetia urbego Leningrado (nun – la rusia St. Peterburgo) s-ino Inna – faka lingvisto, tradukisto, posedanto de multaj lingvoj – post unu jaro restis la sola lernantino en la E-grupo, sed tio donis sian frukton – ŝi tuj ekinstruis, ricevis en Bulgario diplomon de E-instruisto. Veninte al Usono, ŝi eklogîs en sen-E-a urbo kaj nia societo estas la unua usona gastiganto por fervora adeptino de IL.
Dum la kunsido Inna V. ne nur prezentis sin, sed instigis nin ĉiujn ra-konti pri propra E-vivo, sperto ktp. Sur la foto oni povas vidi s-inon Inna starantan kun d-ino G. Novak. Ilin apudas novbakita familio – Roberto kaj Sepideh (pardonu pro ankoraŭ unu eraro en ŝia nomo en la lasta n-ro). Jam duan fojon la klubejon vizitis komencantoj: komponisto Davido (staras apud Karlo) kaj prof. (politikaj sciencoj) Hugh. Post multaj jaroj de foresto inter ni aperis s-ro Eriko (barbulo), kiu ankoraŭ ĝis nun flue parolas E-on.

**Aperis Esperanto-urbo.** Unika evento okazis por la Esperanto-movado: la urba konsilantaro de Herzberg en Germanio, Eŭropo (ĉiuj deputitoj de la 4 kvar partioj kun 3 sindetenoj) voĉdonis la 11-an de Julio pri la nova oficiala nomo de la urbo: Herzberg am Harz, die Esperanto-Stadt/la Esperanto-urbo! La urbo en ĉiu kampo fiere subtenas kaj laŭ sia kapablo antaŭenigas la uzadon de E-o por neŭtrala internacia interkompreniĝo, kaj planas uzi la lingvon por montri al la mondo siajn homajn, turismajn k.a. valorojn.

**UTILAJ RET-ADRESOJ:**

UEA – Universala Esperanto Asocio
http://www.uea.org

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)
http://www.esperanto-usa.org/

Free Esperanto Course on Internet
http://www.pacujo.nu/esperanto/course

Esperanto Viva - A free online course
http://www.mintex.demon.co.uk/espviva/angla/index.htm

Internacia televido en E-o
http://internacia.tv

Reta senpaga enciklopedio
http://eo.wikipedia.org

Esperantic Studies Foundation
http://esperantic.org

Pasporta Servo
http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm

Pola Radio en Esperanto:
http://www.wrn.org/audio/pol1.ram

## Sekvantaj kunsidoj:


**25an de Julio** – literatura vespero, dum kiu oni parolos pri la ŝatataj E-verkoj

**22an de Aŭgusto** – interŝanĝo per sperto, akirita somere: UK, ELNA-kongreso, E-mondo

**26an de Septembro** – tago de la Ruĝa Kruco kaj nia Jubileo

**Antaŭ 35 jaroj, la 30an de Septembro 1971, estis oficiale registrita "Esperanto Society of Chicago". Salutoj estas bonvenataj!!!**

## Libra paĝo




**E-o reklamita mondskale.** Mia 18-jara filino atentigis min pri kelkaj alineoj en la libro de brazila verkisto Paulo Coelho *La alĥemiisto*. Jen estas E-a traduko: "Li dediĉis la tutan vivon al serĉado de tiu unusola lingvo, per kiu parolas la Universo… De komenco li lernis Esperanton, poste ekinteresiĝis pri religioj de la mondo kaj, fine, pri alĥemio. Nun li flue posedas Esperanton, perfekte konas historion de religioj…" Interese, ke la libro jam estis tradukita en pli ol 60 lingvoj. Legu ĝin en via propra aŭ petu brazilianoj esperantigi.

**"Verda" Harry Potter.** Niaj samideanoj kolektas eventualajn subskribojn por eldoni jam tradukitan E-e la unuan volumon de la fama porinfana libro pri aventuroj de juna sorĉisto Haĉjo Potisto *HP kaj la Filozofia Ŝtono*. Vizitu" www.hp-esperanto.com/

**Dika Pomego.** Por verki kompletan analizan recenzon oni bezonus, kompreneble, pli da spaco ol la tutan dikan Pomegon. Pomego??? Nu, ja, klare la aŭtoro instigas nin – ĉu modeste, ĉu ruze? – nomi sian gramatikon Pomego. Li diras tion en la teksto, sed ankaŭ pere de bildo sur la librojaketo kaj durkovrilo. Estu tiel! Li sekvas tie la Zamenhofan regulon, ke lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo senviva kaj tro peza. Pomego ja nepre devos esti tia konsultverko, pli ol studlibro.
Oni nomas ĝin ankaŭ la unua Zamenhofa monumento de XXI-a jarcento, sed oficiala nomo estas la jena: Bertilo Wennergren: Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. Eld. ELNA, El Cerrito, 2006. 696 paĝoj kudre binditaj. ISBN 0-939785-07-2.

**E-vikipedio – pli ol 50.000-artikola!** Ĵus la Esperanto-Vikipedio superis 50.000 artikolojn en la reto. Ĝi do havas la rangon 15 el entute 229 lingvoj, kiuj nun estas uzata de la reta enciklopedio. Tiel la IL eĉ estas antaŭ lingvoj kiel la bulgara aŭ dana. La germana havas pli ol 428.000 artikolojn, la angla – pli ol 1,4 milionojn da artikoloj. La speciala afero de la ret-enciklopedio estas tio, ke la uzantoj de la reto ne nur povas legi artikolon sed mem povas redakti ĝin. Tiel iom post iom ekestas la plej grandaj enciklopedioj en la mondo. Por la Esperanto-Vikipedio laboras pli ol 2.000 kunlaborantoj de pli ol 50 landoj. Adreso de la Esperanta vikipedio: http://eo.wikipedia.org

**Konsilo.** Se vi jam akiris E-Haĉjon Potiston, aĉetis *Pomego*-n, sed ne povas legi artikolojn en Vikipedio – trankviliĝu kaj komencu de io pli simpla. Ekzemple – prenu de ELNA lernolibron laŭ Zagreba metodo kune kun legolibreto *Gerda malaperis* (oni uzis por ĝi nur 500 radikojn) Ekzistas son-versio de tiu libro kaj oni jam filmigis (!) la libron. Poste E-o estos por vi simplega.

**Nepre prenu por la venonta kunsido vian ŝatatan libron!**

Tra polvokovritaj librobretoj vagis kolektante informon

araneoesp @ yahoo.co.uk